A-PDF Merger DEMO : Purchase from www.A-PDF.com to remove the watermark

# STARTO

N-ro 1/2010 (234)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Komputila seminario en Svitavy 23.1.2010
en la elementa lernejo sur la Placo de Paco
En la kurso partoprenis ankaŭ komitatanoj de ĈEA

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 4-foje jare.

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, p/a Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea@esperanto.cz

**Identec-numero (IČ):** 00 44 30 34

**Starto retpoŝte:** starto@esperanto.cz

**Retpaĝaro de ĈEA:** www.esperanto.cz

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 300 Kč, B 200 Kč, C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** 600 Kč komencantoj, 700 Kč progresintoj. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice, melicharkova8@seznam.cz

**Libroservo:** p/a Anna a Jiří Vyšinkovi, Kollárova 131, 696 42 Vracov, tel. 518 628 155, anjivy@seznam.cz

**Sekcioj de ĈEA:** katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, pri informadiko

**Komisiono de ĈEA:** pedagogia

**Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:** Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova@centrum.cz

**BANKO-KONTO de ĈEA:**

195 230 825 / 0300

**Poštovní spořitelna Poděbrady**

**Komitato de ĈEA:**

**Prezidantino:** Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice, melicharkova8@seznam.cz (reprezentado de ĈEA, kunordigado, internaj asociaj rilatoj, metodiko)

**Vicprezidanto (komitatano A de UEA):** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, fakso 257 712 126 chrdle@kava-pech.cz (internaciaj rilatoj, fakaj aplikoj de Esperanto, ĈEA-retkomunikoj, eldona agado)

**Vicprezidanto:** Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, tel. 602 611 584, Tomecek@esperanto.cz (muzeo, konferencoj, TTT, ekster-asociaj rilatoj)

**Sekretario**: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz (protokolado, korespondado, rilatoj kun la banko)

**Kasistino:** Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, libusehyblova@seznam.cz, 774 928 974 (membrobazo, kontado)

**Komitatanino:** Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 942 424, pavladvorakova@tiscali.cz (kluboj, projektoj)

**Komitatano kaj redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 547 240 690, malovec@volny.cz (sekcioj, komisionoj)

**Ĉefdelegitino de UEA por Ĉeĥio kaj UK-perantino:** Lucie Karešová, Havlíčkovo nám. č. 1, 130 00 Praha 3, tel. 603 444 828, Lucie.Karesova@seznam.cz

**Kontrolgrupo de ĈEA:**

*Prezidantino*: Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 461 532 257, dvor.libuse@seznam.cz

Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, 517 385 367, hirs@gm.vyskov.cz

Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 00 Pardubice, Ludmila.Srbova@seznam.cz

**Esperanto-Muzeo en Svitavy:** Ottendorfer domo, Máchova alej 1, 568 02 Svitavy, direktorino: Blanka Čuhelová, tel. 461 532 704, cuhelova@muzeum.svitavy.cz.

**Kontrollegis:** Sabine Hauge, Pavel Polnický, Vratislav Hirš.

# NOVJARA TOSTO DE LA PREZIDANTO DE UEA


Karaj kuntostantoj al la postjubilea nova jaro!

Ni tostas hodiaŭ al nia dokumenta lingvo. Kiam (la en 2009 jubileinta) Lazaro Ludoviko Zamenhof kunmarŝis kun ni sur la valon de la homa egaldigno en 1887, li kreis dokumentan lingvon. Ĝian ĉifron vi povas paki en absurde malpezan broŝureton, en 'ŝlosilon'. Se vi volas, vi povas eĉ sendi dokumenton al homo, kiu ne lernos la lingvon, sed nur devos deĉifri per sialingva ŝlosilo vian dokumenton.

Hodiaŭ ni tostas al nia monumenta lingvo. Kiam (la en 2009 kunjubileinta) Ivo Lapenna grimpis por ni la monton de Montevideo en 1954, la movado gvidata de li sentis la bezonon pruvi sian lingvon kapabla konstrui monumentojn, kapabla ĉiufake funkcii same delikate, same precize, kiel aliaj kandidatoj por la rolo de interŝtata lingvo.

Ni hodiaŭ tostas al lingvo, kiu laboras ponte inter tiuj du skaloj. Neniu lingvo malpli supla povus porti tiel delikatan devaron, ekde simpla dokumenteco, pere de majesta monumenteco, ĝis la respondeco ponti inter la simplemo kaj la majestemo.

Tostas ni hodiaŭ al tiuj, kies inspireco faris el la lingvo personan spertaron disdirendan ankaŭ al tiuj niaj najbaroj, kiuj ne lernis ĝin. UEA lanĉas por la ekanta jardeko Projekton Vizaĝoj – ne malplej per tiu ĉi mesaĝo – kiu spronu vin verki dokumentojn, skulpti monumentojn, por diskonatigi krom Zamenhof kaj Lapenna ankaŭ la multajn prirakontindajn vizaĝojn de la Esperanta mondo. "Vivos eterne pri ili memor'" nur se aperos pri ili materialo biografia – aŭ, se vi preferas, viv-libr-a – vikipedie, foirbude, volumege, broŝurete, do en la tuta bunto de nia repertuaro. Lande, fake, loke, eĉ eksterasocie, kunvizaĝumu kun ni!



*Probal Dasgupta*
*Prezidanto de UEA*
*(Gazetara komuniko de UEA)*

# De IBIRE al Ekotur: ĉi-jare en Suda Bohemio

Ekoturismaj renkontiĝoj havas jam relative riĉan tradicion, tamen laŭ la demandoj, kiujn mi ricevadas, mi eksciis, ke ne ĉiuj komprenas, pri kio temas. Jen do unue ekskurso en la historion de la renkontiĝoj:

Origine mi havis ideon partopreni renkontiĝon de biciklantoj, sed iom alian ol estas biciklaj karavanoj organizitaj de BEMI (Biciklista Esperantista Movado Internacia) aŭ de Johano Vajs el Slovakio. Dum tiuj renkontiĝoj oni biciklas laŭ iu preparita itinero de startloko al celloko survoje tranoktante ĉiutage en alia loko kutime sub tendo. Krome temas pri tagaj distancoj pli ol centkilometraj.




*La unua IBIRE: Doksy 2001*

Ĉar mi mem jam estas tro dorlotita por tiuspecaj aventuroj kaj tamen ŝatas bicikli, mi serĉis alian aranĝon por biciklantoj, pli proksima al „mia“ turismado ne tro laciga, kun sufiĉe da tempo por ĝuo de naturo. Ĉar mi ne trovis ion similan en la kalendaro de Esperanto-aranĝoj, mi decidiĝis mem plenigi tiun niĉon. Mi nomis ĝin IBIRE (Internacia Biciklista Renkontiĝo) kaj la unua okazis en la jaro 2001 en *Doksy* kaj Regiono de Mácha. Mi trovis tie konvenan modestan hotelon, ĉar mia ideo estis loĝi la tutan tempon en unu loko kaj de tie stelforme ekkoni la regionon. Kaj kio plej gravas, mi trovis ankaŭ perfektajn kunlaborantojn: loka fervora biciklantino kaj esperantistino Renata Mauserová preparis allogajn itinerojn por ĉiuj tagoj kaj sperta biciklisto kaj teknikisto Miloš Bloudek estis ĉiam preparita helpi kun teknikaj problemoj rilate biciklojn survoje. La renkontiĝon partoprenis proksimume 20 biciklantoj, inter ili po kvar el Francio kaj Germanio, du el Slovakio kaj la resto el Ĉeĥio. Ĉiuj estis tre kontentaj, tial ni interkonsentis pri la ripeto (ne ankoraŭ tradicio).

La dua IBIRE okazis en Dobřichovice, do la regiono de Bohemia Karsto kaj montetaro Brdy. Ĉar estis tuj post la granda inundo 2002, pluraj aliĝintoj rezignis, ĉar oni timis pri danĝero de infektita akvo, ktp. Tamen ĝi okazis. Venis du francoj, du germanoj kaj kelkaj ĉeĥoj kaj malgraŭ malgranda grupo la aranĝo estis denove tre sukcesa. Ni decidis aranĝadi la venontan ne post unu, sed post du jaroj, kaj en la inter-jaroj organizi ion similan por piedturistoj sub la nomo Ekotur, kio estas mallongigo de Ekoturisma Renkontiĝo. La unua tiu-speca aranĝo okazis en 2003 en Kvilda, kie oni esploris la centran parton de la Šumava-montaro. Nur post tiuj spertoj ekaperis la ideo, ke estus avantaĝe kunigi ambaŭ renkontiĝojn, ĉar fakte ambaŭ grupojn kunigas ŝato de naturo kaj ekoturismo, do fizika senmotora moviĝo, kiu ne postlasas en naturo ajnajn negativajn spurojn.

Do laŭplaĉe oni dumtage aŭ biciklu aŭ piedturismu kaj la vesperaj programoj estu komunaj – kaj ili same kiel antaŭe dependu de la proponoj de la ĉeestantoj: prelegoj kun sekva diskuto pri la ekoturismaj, ekologiaj kaj turismaj temoj, pri la regiono, rememoroj de partoprenantoj pri siaj travivaĵoj kongruaj al la temo, ktp. Kiel nomo de tiu komuna aranĝo restis konservita Ekotur. Kaj la ĉefa celo restis: povi trankvile ĝui kaj admiri la naturon kaj la homan historion tiel, ke restu al oni fortoj ankaŭ por la vesperaj programoj amuzaj, sed ankaŭ edukaj. Do neniukaze temas pri sportaj konkursoj, nek pri longaj veturadoj aŭ marŝadoj. Kutime oni biciklas po proks. 50 km kaj piede iras proks. 10 km, kion eĉ eblas mallongigi (aŭ longigi) laŭ fortoj kaj emoj.

La lasta Ekotur okazis aŭguste 2009 en Svitavy, vesperaj programoj realiĝis plejparte en la tiea Esperanto-muzeo kaj oni ekkonis la vastan ĉirkaŭaĵon kun riĉaj naturaj kaj kultur-historiaj vidindaĵoj, kiel rokaro *Toulcovy Maštale*, kasteloj *Litomyšl* kaj *Nové Hrady*, burgo *Svojanov*, naturekkonaj padoj en *Polička* kaj *Svitavy*, ktp. Unuan fojon ĉeestis ankaŭ ekstereŭropa partoprenanto, nome Normand Fleury el Kanado, profesia biologo kaj hortikulturisto, kiu efike kontribuis ne nur prezentante tre interesajn prelegojn pri naturo (ekzemple pri manĝeblaj floroj), sed ankaŭ survoje, rakontante pri kreskaĵoj, kiujn oni preterpasis.

Ĉi-jare Ekotur okazos de la 14-a ĝis la 21-a de aŭgusto en Suda Bohemio, la regiono de fiŝlagoj kaj kasteloj. Ni loĝos en studenta hejmo de Sudbohemia konservatorio en *České Budějovice*, kiu havas perfekte ekipitajn ĉambrojn, kvazaŭ kiel en tristela hotelo, kaj el la allogaĵoj vizitontaj mi nomu almenaŭ: *Hluboká nad Vltavou* kun siaj du kasteloj (krom la fama novrenesanca ankaŭ la ĉarma ĉasista kastelo kun ekspozicioj pri ĉasado kaj fiŝkaptado), zoologia ĝardeno, Galerio de Aleš kaj fiŝlago *Bezdrev*, du lokoj troviĝantaj en la listo de kulturaj heredaĵoj de Unesko – Český Krumlov kaj Holašovice, sed ankaŭ pitoreska ruino *Dívčí Kámen* (Knabina Ŝtono), la plej alta pinto de *Blanský les* (arbaro Blanský) *Kleť* (1072m), ĉarma historia urbeto *Třeboň*, kie ni realigos „Vojaĝon ĉirkaŭ la mondo" - efektive, ĉar estas por ĉirkaŭmond-vagantoj preparita bela 12 km longa lerniga pado ĉirkaŭ la fama granda fiŝlago *Svět* (Mondo). Ekotur finiĝos sabate matene, por ke la partoprenantoj povu daŭrigi la „sudbohemian restadon" en „Finferia Renkontiĝo" en České Budějovice.

Interesatoj pri pli da informoj kaj aliĝiloj rigardu www.kava-pech.cz/ekotur aŭ skribu al mia adreso Anglická 878, 252 29 Dobřichovice

*Petro Chrdle*



*Burgoruino Knabina Ŝtono (el Vikipedio)*

# AMIKECA HELPO

En la jaro 1997 trafis nian urbon Přerov kaj multajn vilaĝojn en ĝia distrikto pereiga inundo. Precipe trafita estis la vilaĝo Troubky, en kiu multajn domojn ĝi tute ruinigis. Inter ili estis ankaŭ la domo de la prezidanto de nia Esperanto-klubo en Přerov s-ano Antonín Krejčíř kaj grave difektitaj estis ankaŭ domoj de kelkaj klubanoj en aliaj loĝlokoj. Al la klubanoj damaĝitaj tiam pro la inundo finance kaj eĉ materiale helpis la membroj de la E-klubo.

En la jaro 2009 denove trafis nian distrikton tielnomata „fulmrapida" inundo, kiu en la nokto de la 24-a al la 25-a de junio kaŭzis gravajn damaĝojn en kelkaj civitoj de la distrikto. Tiu ĉi situacio memorigis al samideano Krejčíř, la prezidanto de nia E-klubo en Přerov, la malfeliĉajn travivaĵojn de lia familio en la jaro 1997. Tial li proponis al la klubanoj realigi amikecan helpon al iu damaĝita juna familio kun malgrandaj infanoj, al kiu la inundo forprenis ĉion – la domon kun la kompleta ekipaĵaro ktp. La rapida reago de ĉiuj membroj de la E-klubo en Přerov, de iliaj geamikoj, la membroj de kelkaj najbaraj E-kluboj kaj eĉ de laborantino de firmao Gambro Czech Republic s.r.o., kie laboras nia klubanino – la edzino de la kluba prezidanto s-ino Věra Krejčířová – estis admirinda.

Por nia bonfara helpo estis elektita juna familio en urbeto Hustopeče nad Bečvou. En traktado kun la tiea urbestrino ni estis certigitaj, ke temas pri honesta familio, al kiu la inundo likvidis ĉion, do la familio meritas la subtenon. Jam en la 13-a de julio 2009 la reprezentantoj de la E-klubo transdonis al la elektita familio monhelpon de 15.500,- kronoj, al la du kaj duonjara Tomaĉjo (Tomášek) kaj al la kvarjara Helenjo ludilojn, dolĉaĵojn kaj al la gepatroj ankaŭ grandan pakaĵon da nutrovaroj. La renkontiĝo kun la juna familio estis tre kortuŝa. Ne nur ili, sed ankaŭ ni havis la larmojn en la okuloj.

Sed per tiu ĉi renkontiĝo nia helpo ne finiĝis. Okazis plua kolekto inter la klubanoj kaj jam preparita por la transdono estas ne nur la monkolektaĵo, sed ankaŭ amaso da praktike bezonataj aĵoj, kompreneble tute novaj, neuzitaj, kiel litotolaĵoj, viŝtukoj, manĝilaroj ktp. La transdono de ĉio baldaŭ okazos. S-ano Krejčíř estas kun la menciita familio en ofta pertelefona kontakto.

Per tiu ĉi artikolo la E-klubo en Přerov dankas al ĉiuj, kiuj kiel ajn kontribuis al la bonfara kolektaĵo, por helpi kaj iom ĝojigi la junan familion en ĝia malfeliĉa sorto.

*Nome de E-klubo en Přerov Květa Černá*

## Nova retejo en Česká Třebová

La urba muzeo en Česká Třebová kun riĉa Esperanto-kolekto (5500 titoloj) havas nun retejon **http://mmct.cz**.

# Kultura matineo pri d-ro Zamenhof en Písek

La 12-an de decembro en agrabla prelegsaloneto de la urba biblioteko de Písek kunvenis pli ol trideko da personoj por spekti kulturan matineon „Homo kontraŭ Babelo" omaĝe la 150-jariĝo de d-ro Zamenhof. La nomo de la matineo estis transprenita de interesa biografia libro „Člověk proti Babylonu" kiun enĉeĥigis kaj proprakoste eldonis Jindřiška Drahotová (kaj kiu daŭre mendeblas ĉe ŝi). La programo celis ankaŭ la neesperantistan publikon kaj tial ĝi okazis en la ĉeĥa lingvo.

Enkonduke eksonis ĝojigaj salutvortoj de Mgr. Blanka Skučková, estrino de la biblioteka fako ĉe Ministerio pri kulturo, kiu ne nur favoras, sed mem scipovas Esperanton.

La ĉeforganizantino Pavla Dvořáková prezentis koncize biografion de la kreinto de Esperanto, akompanatan de fotoprojekciado. La faktojn akompanis ankaŭ la propraj dirаĵoj de d-ro Zamenhof, kiujn en lia rolo trafe deklamis Jan Fidel Řepa.



Al la solena programo kontribuis ankaŭ Miroslav Smyčka per prelegeto pri homaranismo kaj per „Kanto de l'Ligo" de W. A. Mozart en la traduko de d-ro Zamenhof.

Dum la paŭzo la partoprenantoj povis rigardi kaj aĉeti Esperanto-librojn de la eldonejo KAVA-PECH kaj ankaŭ gustumi adventajn frandaĵojn proponatajn de junaj lokaj esperantistinoj. En la dua parto de la programo Petro Chrdle rakontis pri la unika valoro de Esperanto por rekta ekkonado de fremdaj kulturoj, precipe surbaze de siaj travivaĵoj en Japanio, Margit Turková prezentis humuran rakonton de Čestmír Vidman, kiu antaŭe kunlaboradis kun Eva Seemannová, antaŭe plurfoje aktorinta en tiu ĉi prelegsaloneto.



Post la matineo la partoprenantoj povis viziti adventan ekspozicion en la urba muzeo kaj posttagmeze daŭrigi per solena kaj amuza programo de la tradicia antaŭkristnaska renkontiĝo, okazanta en la sidejo de la Ĉeĥa hobiĝardenista asocio.

Pli da interesaj faktoj pri vivo kaj verkaro de d-ro Zamenhof kaj fotogalerion pri li vi povas vidi kaj elŝuti en http://esperantio.narod.ru/lingve/zajxoj/listo.htm kaj http://galeriodezamenhof.narod.ru/

En la ĉefpaĝo de la urba biblioteko www.knih-pi.cz vi povas trovi artikoleton „Esperanto v knihovně“ (Esperanto en la biblioteko), informanta pri tio, ke librodonacoj de la loka klubo kaj de la eldonejo KAVA-PECH sekvigis fondon de aparta Esperanto-breto en la fremdlingva fako de la biblioteko. La artikolo entenas ankaŭ bazajn informojn pri Esperanto mem kaj kelkajn utilajn retligilojn.


**Esperanto v knihovně**

U příležitosti matiné **„Člověk proti Babylonu“**, které proběhlo 12.12.2009 v klubovně MěK Písek k 150. výročí narození doktora ***L. L. Zamenhofa***, tvůrce mezinárodního pomocného jazyka esperanto, získala knihovna darem do svého fondu vícero publikací v tomto a o tomto pozoruhodném a všestranně užitečném jazyce. (Seznam ke stažení).

*Aktualizováno Pátek, 22 Leden 2010 15:26*

Celý článek...



Esperiga kunlaboro de la loka E-klubo kun la biblioteko plu evoluos per okazigo de **ekspozicio pri Esperanto**, kiu estos senpage videbla **inter 15.3. kaj 15.4.** en la unua etaĝo de la konstruaĵo (en Alšovo nám. 85). Vizitantoj estas elkore bonvenaj dum labortagoj (krom ĵaŭdo) inter la 9-a kaj 18-a h.

*-padv-*

## Komputila seminario en Svitavy

sukcese okazis sabate 23.1.2010 en Svitavy. La eblecon senpage lerni kaj ekzerci ion novan utiligis entute 15 personoj. Kiel planite, la antaŭtagmezo estis pasigita per komunaj prezentoj kaj diskutoj en la Esperanto-muzeo kaj posttagmeze eblis ĝui praktikan ekzercadon en moderne ekipita komputilejo de la loka lernejo sur la ĉefplaco (náměstí Míru). Ni deziras refoje esprimi nian koran dankon al la direktorino Mgr. Věra Hanusová, kiu jam la duan fojon ebligis al ni senpagan luon de la klasĉambro.



*Kurso pri la nova asocia retejo*

Sub gvido de Pavla Dvořáková kaj ĈEJ-anoj Aleš Tomeček kaj Marek Blahuš estis precipe pridiskutitaj praktikaj demandoj rilate al aspekto kaj funkciado de la nova ĈEA-retpaĝaro (kiu espereble plene ekfunkcios ĝis someraj ferioj) kaj estis prezentitaj kaj ekzercitaj kelkaj utilaj Esperantaj retpaĝaroj, kies liston vi trovas aparte en tiu ĉi numero. Vespere estis pritraktita ankaŭ plibonigo de la nuna retpaĝaro de la Esperanto-muzeo. Sekvaj komputilaj seminarioj de ĈEA okazos 9.-11. 4. 2010 dum Sabla Printempo en Písek kaj 27.-28.9.2010 post la ĈEA-konferenco en Poděbrady.

Pri viaj intereso, demandoj kaj proponoj pri kunlaboro rilate al komputila klerigado ni antaŭĝojas en adreso komputado@esperanto.cz

-padv-

# El la mondo esperantista

**Diplomoj pro fidela membreco en UEA.** Fine de januaro 2010 la Centra Oficejo ekspedis la lastajn diplomojn al tiuj individuaj membroj de UEA, kiuj ĝis la pasinta jaro membris en la Asocio minimume 40 aŭ 50 jarojn. Ĉiuj diplomoj estis subskribitaj de la Prezidanto de UEA, prof. Probal Dasgupta. Tiu rekono de fidela membreco estis enkondukita pasintjare kaj la unuaj diplomoj estis disdonitaj en la Universala Kongreso en Bjalistoko. Entute 186 membroj ricevis la honorigon pro 50-jara membreco, dum 259 membroj estis diplomitaj pro 40-jara membreco.

**Ok britaj parlamentanoj** skribe nomumis Universalan Esperanto-Asocion kandidato por la Pac-premio Nobel en 2010. Ili estas parlamentanoj bone konataj en Britujo: Andrew Smith, Austin Mitchell, Bill Etherington, Lord Robin Corbett (Labour), Oliver Heald, Roger Gale (Conservative), Charles Kennedy, Lord Bob Maclennan (Liberal Democrat).

**Rusia Esperantista Unio** (REU) ekhavis novan oficejon en Moskvo apud la metrostacio Alekseevskaja. Nova adreso estas: Grafskij per.,12-A, str. 2; Moskva RU-129626.

**Utopio en kvar movadoj.** En la usona filmfestivalo Sundance okazis fine de januaro la premiero de la filmo „Utopia in four movements“ de reĝisoro Sam Green. Unu el la movadoj estas la esperantista, kiun Sam Green observis kaj filmis i.a. en kongreso de la usona landa asocio ELNA kaj en la Universalaj Kongresoj en Florenco, Jokohamo kaj Roterdamo. La nuna tempo estas laŭ Green malamika al utopioj, sed malgraŭ tio diversaj idealistoj plu persistas, ne perdante siajn idealojn, kaj la simpatio de la reĝisoro estas ĉe ili. Sam Green estas renoma kinisto, kies dokumenta filmo „The Weather Underground“ (2003) pri la tiunoma radikala usona movado en la 60-aj kaj 70-aj jaroj estis nomumita por Oskaro. Multaj esperantistoj helpis al Green en diversaj stadioj de la estiĝo de lia nova verko. Li ricevis asiston i.a. de ELNA kaj ESF. La Centran Oficejon de UEA li unuafoje kontaktis fine de 2005. Dum la Internacia Filmfestivalo de Roterdamo en januaro 2006, en kies programo estis unu el liaj filmoj, Green vizitis la Centran Oficejon por esplori en la Biblioteko Hodler kaj por prepari ĉeeston de sia skipo en Universalaj Kongresoj.

**Malta nuntempa poezio** aperis en formo de antologio esperantigita de Carmel Mallia. La insularo sude de Sicilio, konata pro maltaj kavaliroj, parolas semidan lingvon parencan al la araba, kvankam la loĝantaro estas kristana. Ĝia literaturo estas preskaŭ ne konata eksterlande.

**Tri novaj UEA-komisiitoj.** Gabi Kosiarska fariĝis komisiito pri la Esperanta radiofonio, la brazilano Emilio Cid estis komisiita kunordigi gazetaran kampanjon lige kun estontaj UK-oj kaj Robert Kaminski el Pollando ricevis taskon dokumenti ZEO-jn, t.e. Zamenhof /Esperanto-objektojn.

*laŭ RET-INFO*

# Marcipana Kristnasko



Dimanĉe la 6-an de decembro 2009 okazis en la Esperanto-muzeo la dua Marcipana Kristnasko. Ĝi estis parto de „Kristnasko en Svitavy“. En la muzeon alveturis geedzoj Anna kaj Jiří Vyšinka el Vracov kun siaj marcipanaj produktoj. Ili antaŭĝojis, ĉar ilia lastjara vizito tre plaĉis al Svitavanoj. Al marcipano alveturis ankaŭ infanoj de esperantistoj el Šumperk kaj el České Budějovice. La intereso pri formado de musetoj, porketoj, elefantetoj, fiŝetoj kaj neĝuletoj estis grandega. Infanoj formis laŭ gvidado de Anna Vyšinková dum la tuta tago kaj gustumis marcipanon. Iuj infanoj volis formi ĉiujn bestetojn kaj iliaj patrinoj travivis kelkajn horojn en la muzeo. Poste ili ĝoje foriradis. Ankaŭ por aliaj vizitantoj ni preparis gustumadon de marcipano kaj kokosaj produktoj. Inter la vizitantoj estis ankaŭ produktantoj de marcipano. Ili aprezis la kvaliton kaj belecon de produktoj de geedzoj Vyšinka. Kvankam la instruado finiĝis laŭ invitilo je la kvara horo posttagmeze, la infanoj laboris ĝis la kvina.

Lastjare geedzoj Vyšinka donacis al la svitava klubo du tortojn. La unuan torton donis klubaninoj al infanoj en svitava hospitalo, la duan torton al infanoj en infana hejmo. La ĉi-jaraj produktoj de sinjorino Vyšinková estis donacitaj al infanoj de Speciala lernejo en Svitavy.



Profesiaj figuretoj de la firmao

Lastjare vizitis Marcipanan Kristnaskon ĉirkaŭ mil vizitantoj. Ĉi-jare ili estis malpli multaj, sed infanoj faris preskaŭ trioble da marcipanaj produktoj – ĉirkaŭ 300 pecojn. Alvenis ankaŭ la urba kablotelevido por fari mallongan televidan filmeton. Pri nia aranĝo faris mallongan interparolon kun ni redaktorino de radiostacio el Pardubice sinjorino Pavlasová.



# Kristnaska Poezio



Triesta Esperanto-Asocio
**lanĉas en 2010**
**la 4an Internacian Konkurson**

Estas invitataj partopreni geknaboj el la tuta mondo, kun aĝo de 6 ĝis 14 jaroj, kiuj sendu, ĝis la **15a de novembro 2010**, siajn verkojn al la jena adreso:

Triesta Esperanto-Asocio
Via del Coroneo 15
IT-34133 TRIESTE
Italia

***Oni rajtas kontribui pri la supre indikita temo, per unu aŭ pli da faritaĵoj laŭ la kategorio:***

Kat. 1) Desegnaĵo (ekz: "kiel mi imagas tiun tradician feston", "la Kristnaska Kripo", "familia festo");

Kat. 2) Rakonto aŭ poeziaĵo, maksimume unu A4-formata folio (ekz: kiamaniere oni festas ĝin familie, pensoj pri tiu kristana festo, pri kristnaskaj tradicioj en propra lando, regiono, urbo; malgranda rakonto aŭ poeziaĵo pri kripo, pri la naskiĝo de Jesuo, kristnaska fabelo, …);

Kat. 3) Manfaritaĵo (el gipso, ligno, metalo aŭ papero, aŭ el iu ajn alia materialo).

La ĵurio atribuos al **Kat. 2)** aldonajn 5 poentojn por favori la partoprenon en tiu ĉi branĉo.

***La "rakonto" aŭ "poeziaĵo" estu en la internacia lingvo Esperanto kaj en la gepatra lingvo de la aŭtoro, kaj ĉiuj aliaj faritaĵoj estu akompanataj de frazo aŭ komentario en ambaŭ lingvoj.***

**Por ĉiu verko estu ankaŭ indikitaj:**

* persona kaj familia nomoj;
* malgranda foto de la aŭtor/in/o;
* aĝo;
* lernejo kaj klaso;
* poŝta adreso.

Ĉiuj konkursaĵoj prezentiĝos al publiko dum la kristnaska periodo 2010.

La vizitontoj donos poentojn al la plej bela verko el la tri kategorioj, kaj tiuj ĉi aldoniĝos al la poentoj de la ĵurio.

Oni anoncos la premiitojn, laŭ kategorio kaj aĝo (de 6 ĝis 8 jaroj [A]; de 9 ĝis 11 jaroj [B]; de 12 ĝis 14 jaroj [C]) enkadre de publika ceremonio en Trieste.

***Por kromaj detaloj/informoj:***
***noredv@tele2.it aŭ***
***testudo.ts@gmail.it***

# La 5-a Sabla Printempo en Písek

**9.-11.4.2010**

Ĉeĥa E-Asocio kaj E-klubo „La Ponto“ kunlabore kun Ĉeĥa E-Junularo kaj E@I invitas vin al la 5*-a Sabla Printempo* en Písek (9.-11.4.2010).

<u>Ĉi-jaraj ĉeftemoj de „Esperanto kaj Interreto“:</u>

* Funkciigo de la nova komuna ret-paĝaro de ĈEA kaj ĈEJ
* Evoluigo de la internacia E-datumbazo Bretaro kaj ĝia kunligo kun Elektronika antologio de ĈEA (eldonita en 2009)
* Kreado de Esperanto-subtekstoj kaj dublado por mallongaj filmoj
* Borso de utilaj komputilaj scioj kaj trukoj




*Fotoj el Sabla Printempo 2009*

Aliaj temoj (ekz. Interreto por komencantoj, Kontribuado al Vikipedio) estos instruataj kadre de la konferenco de ĈEA en Poděbrady post la oficiala programo (27.-28.9.2010).

<u>Skiza programo:</u>

Vendrede vespere – Aktualaĵoj en „Esperanto kaj Interreto“

Sabate dumtage kaj dimanĉe antaŭtagmeze – intensa laboro en laŭtemaj grupoj, prezento de rezultoj kaj diskuto. Krome malstreĉiga filma-muzika vespero, urbopromeno, vizito de Esperanto-ekspozicio en la urba biblioteko, fakultative vizito de unika ekspozicio pri astrologio k.t.p.

Dank’ al la denove supozata subvencio de la urbo Písek

<u>la avantaĝa prezo de nuraj 590,- Kč</u>

<u>inkluzivas:</u>

* 2 tranoktojn en moderna studenthejmo proksime al la urbocentro (2-3-litaj ĉambroj, duŝejo/necesejo komunas ĉiam por 2 ĉambroj; kelkaj 1-litaj ĉambroj kontraŭ krompago mendeblas)
* sabate kompletajn tagmanĝon kaj vespermanĝon en urba restoracio
* instruprogramon kun instrumaterialo kaj aliron al Interreto

La prezo validas nur por membroj de ĈEA, ĈEJ, SKEA kaj SKEJ aliĝintaj kaj pagintaj ĝis 21.3.2010!

Krompago por nemembroj 300,-Kč.

Propra tekokomputilo bonvenas, sed ne necesas!

La aranĝo taŭgas ne nur por spertuloj, sed ankaŭ por kutimaj komputil-uzantoj kun meza E-nivelo!

*Pli detalajn informojn kaj aliĝilon bv. ĝustatempe peti ĉe: pisek@esperanto.cz*



# Internacia Junulara Lingvotendaro Jászberény

11-18 de julio 2010
http://ijl.atw.hu/eo.html




# Internaciaj lingvaj kaj turistikaj tagoj

de la 24-a ĝis la 27-a de junio 2010
en la pensiono Kamzík en Studený
Prezo: 91 EUR + 5 EUR lito
Aliĝilon petu ĝis 21.4.2010 ĉe:
nokosaksio@googlemail.com
Norbert Karbe, Dr.-Otto-Nuschke-Str.
12, DE-01796 Pirna

# Enketo

Firmao Sanep (www.sanep.cz/) esploras publikan opinion en Ĉeĥio. Inĝ. Josef Vojáček sendis al ili du demandojn:

**Ĉu vi konsideras justa enkonduki en EU unu oficialan lingvon, kiu por 10% da eŭropanoj estas gepatra, sed 90% da eŭropanoj devas ĝin lerni?**

La homoj respondis jene: jes 16,6% – ne 73,7% – mi ne scias 9,7%.

**Ĉu vi scias flue paroli almenaŭ du fremdajn lingvojn?**

Respondoj: jes 18,7% – ne 79,4% – mi ne scias 1,9%.

Voĉdonis 5535 personoj.

# SET Lančov

1-a etapo 4.7.–17.7.2010
2-a etapo 18.7.–31.7.2010
3-a etapo 1.8.–13.8.2010

Infanoj ĝis 15-jaraj – 2950 Kč
Personoj super 15 jaroj – 3150 Kč

Aliaj kursoj ol Esperanto je 450 Kč pli multekostaj, la 3-a etapo male je 50 Kč malpli kosta. Skribu al Esperanto, 674 01 Třebíč aŭ **info@set-lancov.cz** aŭ vizitu
**http://www.set-lancov.cz**
**http://www.tabory-vysocina.cz/cz/**
**http://www.cesketabory.cz/**
**http://www.detske-tabory.info/**

La tradicia renkontiĝo de la eksaj tendar-anoj okazos 13.-15.8.2010.

# Plasy

La 9-a turisma renkontiĝo (TREP) en la ripozloko Máj en la tagoj 17.-20. 6. 2010 kostas 300,- Kč por ĈEA-anoj kaj 20 eŭrojn por eksterlandanoj. Aliĝojn akceptas: Václav Král, p.o. box 11, CZ 331 51 Kaznějov, aŭ vi povas aliĝi rete: **esperantoplzen@centrum.cz.**

## Guglo festis Zamenhof-tagon

La 15-an de decembro 2009 en 33 lingvaj versioj de Guglo (Google) aperis Esperanto-flago, kio rezultigis ekz. 26 mil vizitojn ĉe la reta kurso *lernu!*, dum normale aperas nur 5 mil vizitoj tage. La ĉeĥa versio Esperanton ignoris, en la slovaka la flago aperis. Esperanto-Civito fieras, ke temis pri ĝia flirtanta flago, ne pri simbolo de UEA.

# HONORAJ MEMBROJ

*daŭrigo de nia prezentado*

## Ludvík Chytil (1929)

*Pro sia propagando de Přerov li ricevis Medalon J. A. Komenio en 2004. Plurajn broŝurojn li esperantigis, inter ili pri inundoj en Lověsice 1997. Tre lin influis trimonata esperantista restado en Brazilo.*



**1. Kiel vi iĝis esperantisto?**

La historieto estas sufiĉe interesa. Aŭtune 1952 mi iris bierumi al la stacidomo kaj tie mi rimarkis afiŝon: *Ĉu vi volas korespondi kun la tuta mondo?* Laŭtvoĉe mi respondis: „Mi volus, sed mi ne scias kiel.“ Nu, kaj tiumomente min prenis ĉirkaŭ la ŝultroj la sorto mem – en formo de Drahoš Kočvara. Ni iris bierumi komune kaj li klarigis al mi, kio estas Esperanto, kaj invitis min al la unua kunveno. Tie li parolis tiel entuziasmige, ke mi restis por ĉiam ... Tiam li laboris en flughaveno, do mi iomete ektimis, kion de mi volas tiu soldato ĉi tie en la stacidomo. Li estis tie kun sia amiko Josef Čermák, kiu poste fariĝis ankaŭ mia multjara kamarado. En Přerov esperantistis plie Richard Jurka, patro de Květa Černá.

**2. Do la afiŝa invito ĉe vi plenumiĝis?**

Neatendite riĉe kaj ne nur per korespondado. Mi povas diri, ke dank' al Esperanto mi havas kamaradojn kaj konatojn en la tuta mondo, kun kiuj min ligis dumviva amikeco kaj multfoje ni vizitis nin reciproke. Mi menciu Gabi Ösz el Hungario (niaj infanoj feriis kune kaj komunikis sole per Esperanto), Apostolon Marov el la bulgara Sozopol kaj Staszek Mandrak el Pollando. Reciprokaj leteroj estas centoj, eble miloj. Helpe de oficisto, mia iama samklasano, mi ricevis vizojn eĉ por la kapitalismaj landoj, tial mi ĉeestis kongresojn en Brazilo, Svedio, Germanio, vizitis Ĉinion. Sed plej gravis mia unua kongreso en Pollando.



**3. Kaj kion pri Esperanto kaj Přerov?**

Tion juĝu aliaj personoj, sed mi opinias, ke en la subkonscio de la loĝantoj estas Esperanto sufiĉe konata. Ni eldonis plurajn materialojn kunlabore kun la muzeo J. A. Komenio, vicon da esperantlingvaj bildkartoj de Přerov kaj libron pri la urbo. Nia komunumo estas sufiĉe forta, mi deziras mencii almenaŭ František Tvrdoň, Miroslav Pikner, Jiřina Vondráková, geedzojn Filip kaj plurajn aliajn. Pardonu mian memoron, se mi iun forgesis.



Rozhovor s Ludvíkem Chytilem, držitelem Ceny města Přerova

Své jméno na zvonku mám i v esperantu

**Mezi vyznamenanými medailí J. A. Komenského jsme četli i jméno Ludvíka Chytila. Této cti se mu dostalo za dlouholetou činnost v esperantském hnutí a za propagaci města Přerova v oblasti esperanta. Poseděli jsme v jeho „esperantské“ pracovně nad časopisy, knihami, fotografiemi, diapozitivy a jinými dokumenty z jeho padesátileté esperantské aktivity. První otázka zněla:**

**Jak ses vlastně dostal k esperantu?**

Náhodou. Vše způsobil obyčejný plakát s názvem *Chceš si dopisovat s celým světem?* Začal jsem navštěvovat kroužek esperanta v železničářském klubu na přerovském nádraží. Bylo to v roce 1953. Mým prvním učitelem byl Drahomír Kočvara, který hovořil o esperantu tak nadšeně, že to byl impuls na celý život.

**Jak sis získal přátele u nás, ale i v jiných zemích?**

Začal jsem jezdit na kongresy a konference do mnoha států. Časem jsem navštívil na pozvání přátel všechny evropské země kromě Řecka. Nejvíc na mě ale zapůsobil tříměsíční pobyt v Brazílii. S těmito esperantisty jsem se seznámil na kongresu v Praze a pozval jsem je na dlouhodobější návštěvu ke mně. Pravidelně se setkávám s přáteli od nás, z Polska a ze Slovenska v Cantoryji, v půvabném beskydském místě na česko-polských hranicích. Setkání míváme vždy třetí neděli v měsíci. Příští měsíc pojedu na kongres do Litvy. Chtěl bych zdůraznit, že při každé příležitosti vyprávím o naší zemi a nikdy nezapomenu být lokálním patriotem.

*S organizátorkou mezinárodní esperantské výstavy v Brazílii*

**Medaili J. A. Komenského však jsi dostal také za propagaci města Přerova v esperantu. Co to konkrétně znamená?**

Všude, kam přijedu, rozdám propagační materiál o republice a současně i o Přerovu. Přeložil jsem sedmistránkový přehled o historii a současnosti Přerova, v brožuře o střední Moravě je značná část o Přerovu, napsal jsem studii o historii esperanta v Přerově od roku 1923, přeložil jsem úvodní část studie PhDr. Jiřího Lapáčka 100 let Michalova. Brožuru o povodních roku 1997 v Lověšicích jsem v překladu rozeslal nebo osobně předal esperantistům v desítkách zemí. Odezva byla nečekaná, reakce výrazná. Dopisy máme uloženy. Jsem rád, že jako občan této přerovské místní části jsem mohl Lověšice tak zviditelnit. V současné době připravuji přehled vývoje zvonařské dílny v Brodku s tím, že také tentokrát jej pošlu svým přátelům. Mohl bych ještě uvést, že jsem přeložil informační zprávu o Přerovských strojírnách, kde jsem byl zaměstnán. Překladů byla celá řada, například o Lidicích, naší kultuře, politice, ekonomice a další.

**Vím, že jsi velmi aktivní v propagaci esperanta. Můžeš k tomu něco povědět, například kolik přednášek, besed a příležitostných povídání jsi absolvoval?**

Za těch padesát let jich byly stovky u nás i v zahraničí. Besedoval jsem pro širší veřejnost, ve školách, v domovech důchodců, v poslední době jsem absolvoval seriál besed v Sonusu pro seniory. Žiju esperantem, je to moje láska i štěstí. Neměnil bych tuto svou životní náplň s ničím jiným.

**Čtenáře bude zajímat tvoje odpověď na moji závěrečnou otázku. Je v současné době ještě esperanto dost živé? Mohla by jeho znalost znamenat posílení přátelství, porozumění a míru na světě?**

To je přece i myšlenka Komenského, jehož jménem označili přerovští radní medaili, které si velice vážím. S esperantem jsem poznal tolik vynikajících přátel! Věřím, že mezinárodní jazyk může pomoci v tomto světě k opravdovému vzájemnému respektu a jasnější budoucnosti lidstva.

**Takže se loučím s přáním - hodně zdraví a síly do tvé další esperantské činnosti. Pan Ludvík Chytil přeložil do esperanta:** *Ĉion la plej bonan en plua laboro.*

*Mgr. Vladislav Kubík*

*Intervjuo en Přerovské listy 2005*

Certan tempon mi laboris en la komitato de ĈEA kaj prezidis la klubon, tio eble ankaŭ helpis, ke pro mia propagandado de Přerov kaj de la muzeo J. A. Komenio mi estis nomumita honora civitano de Přerov en 2004.




*Broŝuroj pri la 80-jariĝo de la klubo*

**4. Mi scias, ke en Lověsice, via multjara domicilo, troviĝas multaj esperantlingvaj trezoroj. Ĉu vi prilaboras ilin?**




*Unu el pluraj esperantlingvaj bildkartoj de Přerov*

Nuntempe ne plu, ĉar miaj ekipo kaj kapo ne sufiĉas por tia tasko: la moderna tekniko komplete preterpasis min. Centojn da bildkartoj, insignoj, poŝtmarkoj kaj pluaj materialoj mi deziras donaci al la Esperanto-muzeo en Svitavy, granda parto de mia libroŝranko iros al la urba biblioteko de Přerov kiel ĝermo de memstara esperantlingva fonduso. Fine mi salutas ĉiujn miajn konatojn kaj amikojn por diri al ili, ke Esperanto donis al mi nekredeble multe kaj ke mi ĉiam restos dankema ...



# Miloslav Šváček (1941)

*Iama junulargvidanto de novfondita en la jaro 1969 Katolika Sekcio de ĈEA, ĉeforganizinto de la katolikaj E-tendaroj en Herbortice, post renovigo de la Katolika Sekcio de ĈEA en la jaro 1990 ĝia prezidanto ĝis nun, ekde la jaro 2003 prezidanto de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, redaktanto de la revuo Dio Benu.*



**1. Ĉu vi povas malkaŝi, kio instigis vin esperantistiĝi?**

En la jaro 1955, estante 14-jara, foliumante en tiam fare de komunistaj regantoj malpermesita gazeto "Gardanĝelo", mi trovis en ĝi kurson de Esperanto gviditan de d-ro Jan Filip. Tuj mi ĉion ellernis. Post kelkaj tagoj mi bonŝance en trajno renkontis s-anon František Svačina, ĉe kiu mi aliĝis al skriba E-kurso. Sek-van jaron mi partoprenis Ĉe-metodan kurson en Somera Kolegio de Esperanto en Doksy sub gvido de s-ano Slanina. Revenante pertrajne hejmen mi jam kapablis esperantlingve konversacii. Poste sekvis E-kursoj en SET Lančov. En la jaro 1962, ankoraŭ en soldata uniformo, mi sukcese partoprenis kurson por instruistoj. En kelkaj SET-oj mi poste gvidis E-kurson. Al Esperanto mi restis fidela seninterrompe eĉ dum malfacila periodo ĝis nun.

**2. Vi menciis malfacilan periodon, pri kio konkrete temas?**

En Konstitucia Kongreso de ĈEA okazinta en la jaro 1969 en Brno estis fondita kadre de ĈEA Katolika Sekcio. Mi estis elektita junulargvidanto de la sekcio. Kun ĉeestanta Josef Kobza mi interkonsentiĝis organizi katolikajn E-tendarojn en lia loĝvilaĝo Herbortice. Ŝraŭbo de t.n. "normaliza procedo" pli kaj pli forte kuntiriĝis sufokante ĉion iamaniere rilatantan la religion. Ni bone konsciiĝis, ke ĉiu nova okazigo de la tendaro kun partopreno plejparte de junularo ankaŭ el eksterlando estas en la ekzistanta politika situacio granda risko. Spite de tio ni ne ĉesis la tendaron plu aranĝadi. Ĉiu denova okazigo de la tendaro estis kvazaŭ miraklo.

Sed la nigraj nuboj jam ŝvebis super la tendaro en la jaro 1977, kiam ĝi okazis jam la 9-an fojon. Tiam mi la tendaranojn atentigis, ke eble ĝia lasta horo proksimiĝas. Meze de la dua semajno okazis invado de StB-anoj (komunista sekreta polico) en la tendaron akompanataj de distrikta (kontraŭ)eklezia sekretario. Dum sekvaj preskaŭ du jaroj estis demand-esploritaj cent ekstendaranoj, por pre-

pari fortimigan juĝproceson. Mi kaj pastro Vojtěch Srna estis akuzitaj pri faro de krima ago de malhelpado de la ŝtata inspekto super eklezioj kaj religiaj komunumoj. Tiam ĈEA min kiel krimulon forpelis. Por mi, la ĉefkrimulo, estis preparita puno de tri kaj duonjara mallibereja restado. Iniciate de Ivo Lapenna la Asocio de Esperantistaj Juristoj organizis tutmondan protestondon. Oficiale protestis ankaŭ Vatikano. Granda kuraĝigo por mi estis persona letero de papo Johano Paŭlo la Dua. Danke al la multnombraj protestoj mi estis laŭ § 178 de la punleĝaro kondamnita al puno de forpreno de libereco en daŭro de 15 monatoj, pastro Srna al 12 monatoj kaj malpermeso de pastra praktikado kaj ĉe ni ambaŭ akuzitoj estis fiksita provtempo en daŭro de 3 jaroj. Dum tiuj tri jaroj ni estis sub kon-stanta kontrolo de StB. Spite de tio miaj aktivadoj ne ĉesis.

La dekjara malpermeso por mi viziti la eksterlandon finiĝis en la jaro 1987. Tiujare mi eluzis la eblecon ekligi personajn kontaktojn kun sendependa sindikata organizaĵo Solidarność (Solidareco). En Gdańsk mi vizitis ĝian prezidanton Lech Wałęsa.

**3. Kion vi povas diri al ni pri la novtempa periodo post la "velura revolucio"?**

Falo de la komunista sistemo en la jaro 1989 ebligis al ni eliri el la katakombaj kondiĉoj. La 7-an de aprilo 1990 la Plenumkomitato de ĈEA kunveninta en Praha, kiun mi ĉeestis kiel gasto, oficiale aprobis refondon de la Katolika Sekcio de ĈEA. Tiama ĈEA-estraro ekskuzis sin pro partopreno en la diskriminacio. Ekestis nova periodo de la ambaŭflanke fruktodona kunlaboro. Mi iĝis prezidanto de la refondita Katolika Sekcio de ĈEA. Tiun funkcion mi plenumas dum dudek jaroj ĝis nun (esperebIe ne kiel ĝisvivan punon). Nia sekcio nunjare do dudek-jariĝis. Ankaŭ nia revuo Dio Benu, kies redaktanto estas mi, eniris sian dudekjaran regulan aperadon kiel kvaronjara periodaĵo. En la jaro 2003 mi estis elektita prezidanto de IKUE kaj en la jaro 2007 reelektita por plua kvarjara periodo.

Ekde la jaro 1991 la sekcio aranĝis 14 Katolikajn E-Tendarojn en Sebranice, kies mi estis ĉefaranĝanto. Ankaŭ mi estis ĉefaranĝanto de tri IKUE-kongresoj: 1985 en Olomouc, 2002 en Kroměříž kaj 2006 en Velehrad.

Okaze de la 90-a datreveno de memstareco de la respubliko honorigis min oktobre 2008 urbo Přerov per medalo de Johano Amos Komenio. Kaj la 5-an de julio 2009 en la tutlanda solenaĵo honore al apostoloj de Eŭropo sanktaj Cirilo kaj Metodio honorigis min Ĉeĥa Episkopara Konferenco per medalo por longjara "konstruado de la pontoj" inter la nacioj pere de IKUE. Tiuj kaj ceteraj honorigoj estas instigiloj por la pluaj aktivadoj malgraŭ tio, ke miaj akti-vadoj ilin tute ne celas.

**4. Kion vi konklude diros al la legantoj de Starto?**



Mi volas esprimi miajn dankojn al ĉiuj, kiuj dum mia sufiĉe longa esperantista periodo kunlaboris aktive kun mi. Kaj ĉiujn legantojn de Starto mi volas kuraĝigi, ke ili neniam bedaŭru la tempon dediĉitan al la Esperanta movado, ĉar ili per tio partoprenis en nobla, sencohava misio.



DIO BENU

INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA 2010 Katolika Sekcio de ĈEA

Gazeto de IKUE-Katolika Sekcio de ĈEA
Agnoskita kiel laika eklezia organizaĵo

Jaro 2010 (20) Numero 1 (77)

KRISTNASKO 2009 SUR LA PLACO DE SANKTA PETRO EN VATIKANO DUM LA PAPA MESA ĜO "URBI ET ORBI" KAJ LIAJ KRISTNASKAJ BONDEZIROJ EN 65 LINGVOJ INKLUZIVE DE ESPERANTO



Samkiel dum la antaŭaj benoj Urbi et Orbi, Kristnaske kaj Paske, ankaŭ ĉi-foje grupo da esperantistoj ĉeestis en Placo de Sankta Petro, por levi alten la panelojn, kiuj konsistigis la vorton "Esperanto".

*De maldekstre: Patrizio Cilli, Jitka Skalická, Giovanni Conti, Enrico Cecchetto, Isabella Fonseca Clerici, nekonata pilgrimulo, Felice Sorosina, Daniela Quartieroni, Giovanni Daminelli. Ekster la foto, sed panelportintoj: Filomena Canzano, Elio Bonomolo.*

La foto transprenita el www.ikue.org

# Pri la eldonejo KAVA-PECH

La agentejo KAVA-PECH (mallongigo de la ĉeĥa: ***K**ongresová **A** **V**zdělávací **A**gntura **PE**tra **CH**rdleho*) estis fondita en 1992.




*Stanjo kaj Petro, fondintoj de la agentejo*

Esperantistoj ofte riproĉas al mi, kial mi ne donis al ĝi iun belan Esperantan nomon. Mi do tuj klarigu, ke mi konante la malfortan Esperanto-merkaton neniukaze planis profesie agi en Esperantujo, tio aldoniĝis nur kiam mi sentis min ekonomie sufiĉe forta.

Kaj krome, mi ne planis agi kiel eldonejo, eĉ mi povas konfesi, ke eldonisto mi fariĝis kontraŭ mia volo: kiam mi, organizante konferencon por la Karola universitato, ekkomprenis, ke la prelegkolekto estas valora kaj do meritus porti ISBN por esti devige envicigata en ĉefaj bibliotekoj kaj bibliografioj, tio montriĝis neebla.

La eldonejoj, kiujn mi alparolis, aŭ priridis min ke mi volas eldoni tian ridinde malgrandan eldonkvanton, aŭ donis al mi neakcepteblan, eĉ astronomian prezon, kiun ne eblis enkalkuli en la konferenckotizon.

Tiam proponis mia edzino kaj kunfondintino de mia agentejo Stanjo ke ni registriĝu en la ISBN-sistemo kiel eldonejo kaj mem eldonadu la prelegkolektojn el niaj seminarioj kaj konferencoj, kion ni ankaŭ faris, kaj tiu trudita agado fariĝis nia hobio, do ni sekve komencis ankaŭ kun aliaj eldonaĵoj kaj de tio jam estis nur paŝeto al kunigi nian eldonejon kun nia komuna hobio Esperanto. Tiel do komencis la eldonejo KAVA-PECH, kiu ekde tiam eldonis pli ol 120 librojn sub propra ISBN (inter ili pli ol 50 en Esperanto) kaj krome similan nombron de libroj ĝi produktis laŭmende por aliaj eldonejoj kaj memeldonistoj.




*Unu el la lastaj eldonaĵoj kun ilustraĵoj de Mirka Tomečková*

Inter laŭmendaj titoloj estas kelkaj vere tre interesaj, ekzemple PIV por SAT (jam du eldonoj) aŭ lernolibro de la itala por svedlingvanoj por sveda eldonejo, ktp. Mi ankaŭ plurfoje ekspoziciis Esperanto-librojn en foiroj, ekz. en librofoiro Lepsiko, librofoiro en Havlíčkův Brod aŭ Edutech en Prago. La plej prestiĝa foir-atingo estis tamen ekspozicio de nia libro ĉe la plej fama kaj ankaŭ plej multekosta librofoiro, tiu en Frankfurto. Sed ne estis mi, kiu pagis tion. Temis pri la libro produktita kun du ISBN kunlabore kun la eldonejo KoPäd München, kiu elektis tiun nian komunan libron por sia ekspozicio. Mi ne prisilentu, ke en la fono de tiu kunlaboro estis Prof. H. Frank, al kiu mi estas pro tio tre danka.





*Ŝatata ilustristo estas Pavel Rak*

Sed revene al la Esperanto-fako de KAVA-PECH. Kiel konate, la Esperanto-merkato estas tro malforta, tial ankaŭ la eldonkvantoj devas esti malgrandaj, rezulte la prezoj de unuopaj eldonaĵoj altaj. Por mildigi tion, mi por la Esperanto-libroj donas al la membroj de ĈEA (kaj ĈEJ kaj AEH) kaj SKEF (kaj SKEJ) rabaton, kiu egalas pli malpli la produktoprezon kun nur minimuma prezaltiĝo por la fiksaj prezoj de stokado kaj ekspedo. Parenteze, mi daŭre sentas min ĉeĥoslovako kaj slovakojn mi neniukaze konsideras „eksterlandanoj“, tial komprenu, ke mi donas al ili la samajn kondiĉojn kiel al la ĉeĥaj organizitaj esperantistoj.

Mi povas fieri, ke krom kelkaj eldonaĵoj el la komenco, kiam ni kolektis spertojn kaj faris ankaŭ erarojn, miaj libroj estis ĉiam konsiderataj de fakuloj kiel la plej profesiaj. „Arne, la ĉefido“

estis deklarita dum la UK en Florenco infanlibro de la jaro – kaj amuzplezurigis min, kiam mi legis en iu recenzo en la revuo Esperanto pri iu eldonaĵo, ke la libro estis tiel perfekte farita, ke la recenzanto supozis, ke ĝin eldonis KAVA-PECH. La plej furora el miaj libroj en Esperanto ĝis nun fariĝis Ilustrita frazeologio, komuna verko de lingvistino prof. Sabine Fiedler el universitato en Lepsiko kaj ĉeĥa humuristo kaj ilustristo Pavel Rak. Ĝia dua eldono viciĝis dum la UK en Bjalistoko inter 10 plej vendataj libroj.




Ĉiujn E-librojn de KAVA-PECH vi povas trovi ĉe **www.kava-pech.cz**. Organizitaj esperantistoj ne forgesu klaki al „Avantaĝoj por membroj de ĈEA/ SKEF“ por ekscii la rabatitajn prezojn. Sed kontraŭ la samaj rabatitaj prezoj vi povas ilin aĉeti ne krom rekte ĉe la eldonejo ankaŭ en la libroservo de ĈEA (Anna Vyšinková, Kollárova 131, 696 42 Vracov, rete: anjivy@seznam. cz), persone en la Esperanto-muzeo en Svitavy kaj en Slovakio ĉe la eldonejo Espero de Peter Baláž.

Fine mi aldonu, kio aperos en Esperanto en la plej proksimaj monatoj: Lernolibro de Stano Marček *Esperanto přímou metodou* (vidu ankaŭ p. 27), miniatura sed pensiga verketo de Max Kašparů *Kristnaskaj konsideroj kaj kristnaskaj paradoksoj* en la traduko de Marek Blahuš, *Ekoturisma terminaro* de Zdeněk Pluhař kaj espereble ankaŭ la tria komplete tralaborita verko de mi mem *Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj*.




*Sukcesaj estis ankaŭ sonregistraĵoj*

Bonvolu scii, ke ne mankas bonaj manuskriptoj en Esperanto. Kio mankas, estas mono por eldoni ilin. Kaj do la demando, ĉu baldaŭ aperos pliaj belaj libroj en Esperanto ĉe la eldonejo KAVA-PECH dependas ankaŭ de vi, ĉu vi riĉigos vian bibliotekon samtempe helpante revenigi la monon elspezitan pro la antaŭaj eldonaĵoj.

*Petro Chrdle, chrdle@kava-pech.cz*



# Rekomendataj retpaĝaroj (daŭrigo)

**http://cs.lernu.net/** Instruportalo kun 40 senpagaj diversgradaj E-kursoj. Rekomendu al viaj gekonatoj! Tamen ĝi proponas multon pli! Ekz. en la rubriko „Učení“ troveblas utilaj frazoj, bildvortaro, ĉeĥlingva klarigo de E-gramatiko, plej oftaj demandoj kaj eraroj en E, diversaj specoj de lingvoekzercoj kaj lingvoludoj. Ĉion ĉi vi povas utiligi instrucele en viaj kluboj aŭ dum viaj aranĝoj.

**http://edukado.net/** Valora paĝaro pri E-instruado. Post senpaga registriĝo eblas ne nur rigardi, sed ankaŭ senpage elŝuti en sian komputilon diversajn valorajn materialojn. Ekz. en la rubriko Legejo troviĝas kelkdek diverstemaj prelegoj kaj artikoloj, en Filmejo instrufilmetoj, en Lerniloteko eblas laŭ diversaj kriterioj trovi taŭgan lingvoekzercon por sia instrubezono.
Retligiloj rekomendas pluajn utilajn informfontojn surrete. Kaj multaj aliaj interesaj rubrikoj!

**http://esperanto.com** Beta-versio de la nova internacia virtuala komunumo de esperantistoj, socia reto, en kiu vi povas komuniki kun amikoj, krei grupojn kaj partopreni en ili, aliĝi al eventoj, verki blogaĵojn, alŝuti fotojn, ludi ludojn, diskuti ks.

**http://esperanto-panorama.net/unikode/dissendo.htm** Listo de 200 senpagaj dissendo-listoj en Esperanto kaj instrukcioj pri ilia uzo – ebleco rapide kaj facile teni viglajn internaciajn skribkontaktojn en diversaj temgrupoj kaj esti informita pri tio, kio vin interesas – sen devi nepre skribi longajn leterojn!

**www.ipernity.com** Internacia socia retejo, kiu ebligas (post senpaga registriĝo) senpage havigi retspacon por krei blogon, publikigi fotojn, filmojn kaj sonaĵojn kaj partopreni en sociaj retoj – facile krei amikajn kontaktojn, sendi mallongajn mesaĝojn, diskuti. La plurlingva interfaco funkcias ankaŭ en Esperanto, kaj dank' al esperantisto Vladimír Türk nun ankaŭ en la ĉeĥa. La tre vigla kaj interesa Esperanto-komunumo havas minimume kelkcent membrojn el la tuta mondo.

**http://beta.visl.sdu.dk/lingvohelpilo/** Inĝenia utila programo kiu kapablas kontroli E-tekstojn (ne nur mistajpojn, sed ankaŭ gramatikajn erarojn!). Klakinte al la vorto „Lingvohelpilo“ supre maldekstre oni tajpas aŭ kopias la tekston en la aperintan kadron, klakas al „Kontroli“ kaj atendas la rezulton. Funkcias surrete, ne necesas instali ĝin.

**www.youtube.com** La plej ampleksa kaj plej populara servilo por senpage partumi diverstemajn (ne nur muzikajn) mallongajn videofilmojn. Videblas kaj elŝuteblas tie ankaŭ centoj da filmetoj en aŭ pri Esperanto. I.a. kompleta videolingvokurso „Mazi en Gondolando“, 6-parta informfilmo (ĉeĥlingve parolata“ „Esperanto je ...“, kantoj de diversaj E-kantistoj kaj grupoj k.a. Se vi enskribas en la serĉtrabon la vorton „subtekstoj“, vi trovos tie plurajn interesajn alilingvajn filmetojn subtekstigitajn en Esperanto (i.a. oficialajn antaŭfilmojn al komerce distribuataj kinejfilmoj).

Free Youtube Donwloader Converter – programo elŝutebla ekz. en **www.stahuj.centrum.cz** (senpage) ebligas facile elŝuti filmetojn el Youtube kaj konservi en via komputilo, kaj samtempe konverti al aliaj formatoj (AVI, mp3 kaj multaj aliaj).

**http://filmoj.net** Verda Filmejo – kelkdek senpage elŝuteblaj tutvesperaj filmoj diversĝenraj komplete subtekstigitaj en Esperanto

*-padv-*

## 46-an Baltiaj Esperanto-Tagoj

BET-46 okazos en orientlitovia urbo VISAGINAS, kiu situas 150 kilometrojn for de litovia ĉefurbo Vilnius proksime de la landlimo kun Belorusio. BET-46 funkcios de la 26-a de junio ĝis la 4-a de julio 2010. Veni al la aranĝo eblas jam la 25-an de Junio.

Aliĝkotizo 55 lidoj por esperantistoj el ekssovetiaj landoj. Eblas aliĝi telefakse +370-37-228616 aŭ rete **litova.ea@ mail.lt**.

## Konferenco EEU

Eŭropa Esperanto-Unio organizos en Hamburgo en majo 2011 internacian konferencon pri la temo **„Kia estus Eŭropo nun, se EU neniam estus fondita?“** Ni antaŭvidas partoprenon de ĉirkaŭ 100 personoj kaj prelegojn de eksaj politikistoj, kiuj kunkreis eŭropan politikon en la lastaj jardekoj, de historiistoj kaj ekonomikistoj. Nun ni pretigas la projekton por financado fare de EU kaj devas detale priskribi la konferencplanon. Ni tre petas ĉiujn el vi, kiuj povus rekomendi al ni fakulojn pri historio kaj ekonomiko, kiuj povus prelegi en tiu konferenco, ke ni kontaktu ilin, demandu ĉu ili pretus kaj povus partopreni kaj planu ilian ĉeeston. Gravas homoj, kiuj studis la historion kaj ekonomiajn situaciojn en Eŭropo ekde kvindekaj jaroj de la pasinta jarcento, speciale en landoj, kies historio verŝajne alie evoluus sen EU (Balkanio, Belgio, Hispanio, Baltaj kaj eksorientaj landoj...)

*Zlatko Tiŝljar* **ztisljar@gmail.com**

# Kato en nia hejmo

*(Terminologia iniciato)*



Dum la kato sovaĝa vivas en arbaroj, nia hejma kato tenas sin proksime ĉe ni. Ĉu oni nomu ĝin malsovaĝa, ĉu hejma, ĉu endoma? Jen la problemo, kiamaniere esperantigi la ĉeĥlingvan adjektivon „domácí“? Memkomprene temas ne nur pri la kato, sed ankaŭ pri ceteraj malpli bonvenaj kunloĝantoj, ekz. pri muŝo (Musca domestica). Ĝuste la internacia nomenklaturaĵo pelas min al la propono lanĉi la Esperanto-ekvivalenton domesta, interpreteblan ĉu kiel kunmetaĵon dom-esta, ĉu kiel novan radikon domest-a . . .

Ĉi-loke utilos koncerna ekzameno de lingvoj senpere parencaj al la latino.

Itale: domèstico kun la fakultativo domesticar (ĉeĥe „ochočit“)

Hispane: doméstico, domesticar

France: domestique, domestiqer.

El tio nepras mia konkludo por Esperanto, nome la adjektivo domesta kaj la faktitivo domestigi, sendube pli eleganta ol malsovaĝigi, eĉ pli preciza ol endomigi aŭ hejmigi. Nature, ankaŭ la ĉeĥa participo „ochočený“ = domestigita ...

Praha 18.2.2010 *Josef Kavka*

# Invitilo
## al Esperanto-renkontiĝo en Svitavy, la 6-an de marto 2010



*Kolektiĝo de la partoprenantoj en Esperanto-muzeo, náměstí Míru 1, ekde la 8-a horo*

*Programo:*
*9:15 h – foriro al sidejo de Urba Polico - rigardado, diskuto kun policano en la nova inform-centro kaj kafejo de Oskar Schindler (en la parko de Jan Palach)*
*12:00 h – tagmanĝo en restoracio Astra en la busa stacidomo*
*13:30 h – programo en la Esperanto-muzeo: video el UK Bjalistoko, informoj el rondetoj, tombolo, aktualaĵoj kaj aliaj aranĝoj en la muzeo*

*Malfruiĝintajn partoprenantojn ni atendos laŭ peto antaŭ la fervoja stacidomo – anoncu vin anticipe ĉe la ret-adreso: dvor.libuse@seznam.cz aŭ telefone: 606 605 374*

*Kore invitas Klubo de Esperanto-amikoj en Svitavy*

# Bohemia Paradizo invitas vin

Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj (AEH), Na Okrouhlíku 953/21 53003 Pardubice aranĝas jam la 30-an, do jubilean lingvan seminarion en la vilaĝo Skokovy en la pensiono ESPERO en la tagoj de la 12-a ĝis la 18-a de aprilo 2010.





Vespere de la 20-a horo estas prelegoj, diskutoj, rakontado, videofilmoj, ludoj kaj amuzo. Partopreno de posttagmezaj kaj vesperaj programoj ne estas deviga.
Kapacito de la pensiono estas 60 litoj.
***La prezo por 1 tago/persono = 370 Kč, partoprenkotizo = 150 Kč.***

**Limdato por aliĝi plej malfrue ĝis 10. 3. 2010 ĉe la adreso: Pavel Nechvíle, Fügnerova 233, 533 51 Pardubice, telefono 737 606 559, *aŭ ret-pošta adreso: nechvilep@seznam.cz***

La pensiono ESPERO troviĝas proksimume 75 km nordoriente de Prago. Aŭtomobile vi facile trovos la lokon laŭ la mapo. Trajne la pensiono estas plej bone atingebla el Praha – Hlavní nádraží (ĉefa stacidomo) direkte al Turnov, tra Neratovice, Všetaty, Mladá Boleslav, Bakov, Mnichovo Hradiště ĝis Loukov u Mnichova Hradiště.

# Emociiga transdono de festlibro al Humphrey Tonkin

Sabaton, la 9-an de januaro, okazis en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo varmetosa aranĝo, dum kiu oni transdonis al prof. Humphrey Tonkin la festlibron "La arto labori kune" eldonitan de UEA okaze de lia 70-a datreveno. Prof. Tonkin festis sian naskiĝtagon la 2-an de decembro, sed la festlibro estis publikigita en januaro lige kun lia ĉi-jara vizito al la Biblioteko Hodler pro lia bibliografia laboro por la usona Asocio de Modernaj Lingvoj. La transdonon ĉeestis 50 invititaj gastoj, i.a. la estraranoj de UEA, la prezidanto de la Akademio de Esperanto, prof. John Wells, kaj multaj kontribuintoj al la festlibro.




Komence de la ceremonio prezidanto Probal Dasgupta prezentis tre personan laŭdacion al la jubileulo, verkitan en poezia formo. Sekvis laŭtlego de gratul-mesaĝo de d-ro L.C. Zaleski-Zamenhof al sia "pli juna amiko". La redaktoroj de la festlibro, d-ro Ulrich Lins kaj d-ro Detlev Blanke faris prelegojn, en kiuj ili prilumis la enhavon de la libro. D-ro Lins parolis pri la movada agado de Humphrey Tonkin, dum d-ro Blanke priskribis lian kontribuon al la lingvopolitiko. Poste la korojn de la publiko tuŝis bela interpreto de la poemo "La vojo" de L. L. Zamenhof, deklamita de Wera Blanke. La programo kulminis, kiam prezidanto Dasgupta enmanigis al sia elstara antaŭulo la imponan 900-paĝan libron, kiu konsistas el artikoloj, eseoj kaj rememoroj de tuta cento da kontribuintoj. Post longa aplaŭdo la emociita jubileulo respondis per dankvortoj al la realigintoj de la librego kaj per omaĝo al multaj aliaj esperantistoj, kiujn li renkontis kaj kun kiuj li kunlaboris dum sia pli ol 50-jara esperantisteco. Al Tonkin precipe plaĉis la titolo de la festlibro, "La arto labori kune", kiel esprimo de la ideo, kiu ĉiam estis al li tre grava en lia agado. Post komuna tosto la ĉeestantoj ricevis la honoron esti la unuaj por akiri la novan libron kaj ricevi por ĝi aŭtografon de Tonkin. La tuta aranĝo estis filmita por la Reta Kinejo de UEA.

"La arto labori kune" kostas 60,00 eŭrojn kaj estas mendebla ĉe la Libroservo de UEA kaj baldaŭ ĉe aliaj libroservoj. Mendante ĉe UEA oni ricevas rabaton de 1/3 ekde samtempa aĉeto de minimume 3 ekzempleroj. (Aldoniĝas 10% por la sendokostoj kaj en EU imposto de 6%.)

*(Gazetara Komuniko de UEA)*

**Rimarkigo:** El ĉeĥaj aŭtoroj kontribuis Věra Barandovská-Frank (*Arto inter lingvo kaj literaturo*), Petr Chrdle (*SAEST kaj KAEST. Pri fakaplikaj aranĝoj en Ĉeĥio kaj Slovakio*), Vlastimil Novobilský (*Ota Ginz. Esperantisto en Ĉeĥoslovakio*) kaj Miroslav Malovec (*Estonto de la cifereca mondo*).

# Ĥaosa geografio

En geografiaj datoj eraras ne nur laikoj, sed bedaŭrinde eĉ fakuloj. En ĉeĥa Poŝatlaso de la mondo, eldonita en la jaro 2003, oni trovas jenan informon: "La plej orienta punkto de kontinenta Eŭropo kaj de la tuta mondparto: orienta montpiedo de Polusa Uralo (Rusio) 67°20' de la orienta longitudo." Sed tio validas nur por la kontinenta Eŭropo kaj ne por la tuta mondparto. La aŭtoroj forgesis, ke Ĵelania kabo sur la insularo Novtero (laŭ la Nova PIV: Nova-Zemlo) troviĝas ankoraŭ pli oriente.

En la sama atlaso oni trovas: "La plej suda punkto de la tuta Azio: insulo Pulau Pamana (Indonezio) 10°58' de la suda latitudo." Ankaŭ tie ĉi la aŭtoroj forgesis, ke pli sude troviĝas Kokosa insularo, kiu ja apartenas al regno Aŭstralio, sed geografe ĝi sendispute apartenas al Azio.

Kiel la plej suda punkto de kontinenta kaj de la tuta Nordameriko estas tie indikata kabo Punta Marialo en Panamo: 7°12' de la norda latitudo. Tie ĉi la aŭtoroj forgesis nenion, krom tio, ke la limo inter Norda kaj Suda Amerikoj ne troviĝas sur la Panama istmo, sed en Kolombio, kie tiun ĉi limon prezentas rivero Atrato, kies fonto, prezentanta la plej sudan punkton de kontinenta Nordameriko, troviĝas pli sude ol menciita kabo. Ankoraŭ pli sude troviĝas Kokosa insulo apartenanta al Kostariko, kaj plej sude troviĝas insulo Malpelo, kiu apartenas al Kolombio, tamen ĝi prezentas la plej sudan punkton de la tuta Nordameriko.

Verŝajne ĉiuj laikoj kaj eĉ multegaj fakuloj ne konsideras diferencon inter terminoj "kontinento" kaj "mondparto". Kontinento estas tuto limigita nature kaj mondparto estas limigita de homoj. Tial kontinento kaj mondparto ja povas esti identaj, sed ne devas esti identaj. Identaj (kontinento kaj mondparto) estas Afriko, Oceanio (ofte nomata Aŭstralio kaj Oceanio) kaj Antarkto. Mondpartoj Eŭropo kaj Azio troviĝas sur unu kontinento – Eŭrazio, kaj mondparto Ameriko konsistas el du kontinentoj: Nordameriko kaj Sudameriko.

Arkto havas kvin sinonimojn: Arktio, Arktido, Arktiko, Arktiso kaj arkta regiono. Same Antarkto, sed tie unu el ili, nome "Antarktido", estas uzata ne por la tuta mondparto, sed por nura antarkta solida tero. Normigistoj volus la "ĥaoson" forigi, sed mi simpatias kun André Cherpillod, kiu skribis: "Por nomi landon, oni kelkfoje havas iom vastan elekteblecon. Ekzemple, Afganio, Afganujo, Afganlando, Afganistano; Eburio, Eburbordo, Ebura Bordo, Eburlando, eĉ Ivorio kaj Kotdivoaro. Kial plendi pri tio? Nur ploremuloj bedaŭras tiun riĉecon."

*Lubomír Středa*

P.S. *Bonespera Kabo* estas provinco en la Sudafrika Respubliko, nomata ankaŭ Kablando, dum *Bonespera kabo* estas vere kabo. Tial estas pli racie skribi Blanka monto, Blanka maro k.s., se temas vere pri monto kaj maro.

# Kluba vivo

**Brno:** La klubo kunvenas trifoje monate, krom la tria merkredo, en Starobrněnská 15, ĉiam kun prelego de iu klubano. Slavomír Barták, František Frýbert kaj Zdeněk Závodný festis 80-jariĝon, vivjubileon havis ankaŭ Věra Podhradská. Klubanoj kolektas informojn por *Memoro de la ĉeĥa Esperanto-movado* (Werner, Podhradská, Malovec). J. Vojáček instruas Esperanton ĉe Masaryk-universitato. M. Blahuš kaj M. Hruška laboras en komitato de ĈEJ. J. Werner prilaboras bultenon Konstru-forumo.

**Ostrava:** La 18-an de novembro 2009 kunvenis la klubanoj el Ostrava-Vítkovice kaj Poruba ĉe la tombo de Drahomír Kočvara, de kies morto pasis jam 6 jarojn. Samtage ili rememoris ankaŭ la 150-an datrevenon de Zamenhof. La klubo Ostrava-Poruba finis sian agadon kaj kunfandiĝis kun la klubo Ostrava-Vítkovice.



*Ĉe la tombo de D. Kočvara*

**Svitavy:** La klubanoj zorgas pri la Esperanto-muzeo, kie okazis ankaŭ asocia konferenco, Muzea Nokto, Marcipana Kristnasko, seminario pri strategio, EKOTUR, vizite venis direktoro de Ĉina Radio kaj ĵurnalistino Lina Chen. M. Čumová prilaboras la muzean bibliotekon, M. Minářová instruas infanojn en elementa lernejo kaj vespere plenkreskulojn, L. Dvořáková organizas infanajn tagojn, prizorgas subvenciojn de la urbo, informas lokan gazetaron, gvidas la asocian kontrolgrupon. La klubo presigas kaj distribuas Starton.

**Ústí nad Labem:** La klubo kunvenas lastan ĵaŭdon en monato en la polikliniko Doktus. Multjara membro Jiří Laube forpasis en septembro, Josef Kříž transloĝiĝis al orienta Bohemio, do restis 16 membroj. V. Novobilský kontribuis al festlibro de Tonkin per artikolo pri Ota Ginz, Jiří Rada verkis lingvistikan artikolon por Verda Saksofono 2/2009, Zdeněk Rusín prezentis Esperanton en la gazeto *Naše rodina* (Nia familio), plie li daŭrigas tradukadon de *Esperanto, la nova latino de eklezio* (U. Matthiass). Josef Semanišin hejme zorgas pri la kluba biblioteko. Kluba komitato: V. Novobilský (prezidanto), Z. Rusín (vicprezidanto), V. Novobilská (kasistino), M. Krejčová (kronikistino).

# Asocia Kroniko

**Vlastimil Novobilský.** Honora membro de ĈEA, emerita universitata profesoro, prezidanto de la klubo en Ústí ĝisvivis la 15-an de februaro 2010 sian 75-jariĝon. Jam kiel junulo li famiĝis per verkoj pri Esperanta literaturo, al kiu li dediĉis sian atenton ankaŭ rilate al sia bopatro Jiří Kořínek. Intervjuon kun V. Novobilský ni prezentis en Starto 3/2008.

**Jiří Vychodil.** Honora membro de ĈEA, multjara redaktoro de Aŭroro, gazeto en Brajla skribo, eksa prezidanto de la sekcio de nevidantoj, atingas 70-jariĝon la 4-an de marto 2010. Ankaŭ li estis jam intervjuata en Starto 1/2008.

**Rememore.** Estas preskaŭ nekredeble, sed jam pasis 10 jaroj, post kiam forlasis nin neforgeseblaj esperantistoj Eva Seemannová, Marie Bartovská, Stanislava Chrdlová, Vladimír Váňa, Jaromír Šikula, Pravoslav Sádlo-Páv, Jiří Karen (propranome Ladislav Podmele), slovako Eduar V. Tvarožek kaj amiko de Esperanto, operkantisto Václav Halíř.


**František Mančík** el Slavkov forpasis la 17-an de novembro 2009 ne ĝisvivinte sian 97-jariĝon.

# Muzea nokto en Esperanto-muzeo

La 12-an de junio okazos en Svitavy Muzea Nokto. Dum ĝi estas preparata riĉa programo ankaŭ en Esperanto-muzeo.




Komence, jam ekde la 16-a horo estos inaŭgurata nova ekspozicio dediĉita al *Desegnita humuro* kaj ilustraĵoj de Pavel Rak. Ĝin sekvos bapto de la lernolibro *Esperanto přímou metodou*, kies eldonon preparas la eldonejo KAVA-PECH. Temas pri fama lernolibro aperinta jam en 24 lingvoj. La bapton ĉeestos ĝia aŭtoro Stano Marček, ilustristino Linda Marčeková kaj tradukinto ĉeĥen Max Kašparů, de kio klaras, ke sekvos aŭtografado, kiun partoprenos ankaŭ Pavel Rak subskribante sian libron *Desegnita humuro*. La rolon de baptopatrino akceptis Jana Melichárková, mem aŭtorino de duvoluma lernolibro de Esperanto por infanoj, multjara gvidantino de la ĉeĥa ILEI-sekcio kaj prezidantino de ĈEA.




La programo kontinuos per „Desegnado de infanoj kun Pavel Rak“, do la patropreno estos alloga ankaŭ por viaj etuloj. Krom tio eblos memkomprene uzi la okazon kaj partopreni same riĉan programon en la Urba Muzeo kaj Galerio. Do ne hezitu kaj enskribu en vian kalendaron al la dato 12.6.10 la noton „Svitavy“! *-pch-*

# 1450 ADRESOJ EN PASPORTA SERVO

*La ĉi-jara adresaro de la plej fama servo de TEJO, Pasporta Servo, enhavas 1450 gastigantojn en 91 landoj. En la antaŭa eldono (2008) estis 1225 adresoj en 90 landoj. En la Pasporta Servo 2010 la unuan lokon okupas Francio kun 177 gastigantoj. La dua estas Germanio kun 117. En Brazilo estas 84 gastigantoj. Aliaj landoj kun multaj adresoj estas Rusio (81), Pollando (75), Ukrainio (65), Usono (63), Hungario (53), Japanio, Nederlando, Ĉinio kaj Senegalio (po 36), kaj Irano (34).*

*En la 208-paĝa poŝlibro troviĝas, krom la adresoj k.a. informoj pri la gastigantoj, ankaŭ mapoj kun indikoj pri lokoj kun gastigantoj. Enestas ankaŭ reguloj kaj konsiloj pri la uzo de la servo, kaj utilaj adresoj.*

*La ideo pri Pasporta Servo, tiam sub la nomo Programo Pasporto, estis prezentita de la argentinano Ruben Feldman González en 1966. La unua adresaro laŭ la nuna sistemo, kun 40 gastigantoj, aperis en 1974 sub la gvido de Jeanne-Marie Cash el Francio. Ambaŭ pioniroj estas gastigantoj ankaŭ en la nuna eldono.*

*En 2009, Pasporta Servo fariĝis ankaŭ socia retejo, www.pasportaservo.org, kie kaj gastoj kaj gastigantoj povas membriĝi kaj kontakti unu la alian. La retpaĝo ne anstataŭas la adreslibron sed proponas novajn servojn, haveblajn nur per Interreto: zomebla monda mapo, serĉilo, forumo por peti informojn pri vojaĝo, kaj blogejo por rakonti pri siaj vojaĝoj. La retpaĝo nun havas pli ol 1200 uzantojn, el kiuj ĉ. 700 estas gastigantoj.*

*La adresaro estas aĉetebla ĉe la libroservo de UEA. La prezo estas 9,00 EUR plus afranko (plus imposto de 6% en EU). Ekde 3 ekz. oni ricevas trionan rabaton.*

# Rozpočet svazu za rok 2009 a plán na rok 2010

| **Příjmy** | rok 2009 | plán 2010 |
|---|---|---|
| předplatné Starto | **1 354** | 1 000 |
| písemné kurzy | **3 600** | 3 000 |
| prodané zboží libroservo | **6 335** | 3 500 |
| úroky z účtu | **904** | 1 000 |
| kurzové zisky | **352** | 0 |
| příspěvky UEA | **32 320** | 20 000 |
| UK kongresový poplatek | **12 450** | 60 000 |
| konference ČES | **72 930** | 100 000 |
| příspěvky IFEF | **3 450** | 0 |
| příspěvky ILEI | **1 700** | 1 200 |
| příspěvky ČES na běžný rok | **26 550** | 26 000 |
| příspěvky ČES na budoucí rok | **30 930** | 30 000 |
| mimořádné příspěvky | **17 272** | 20 000 |
| dotace | **30 000** | 30 000 |
| příspěvky(dary) | **26 000** | 30 000 |
| příjmy z akcí klubů | **15 910** | 20 000 |
| ostatní nedaňové příjmy | **1 075** | 0 |
| **Příjmy celkem** | **283 132** | 345 700 |
| | | |
| **Výdaje** | | |
| Poštovné a tisk Starto | **53 454** | 42 000 |
| muzeum (propagace) | **26 835** | 30 000 |
| konference | **63 741** | 90 000 |
| poštovné a balné libroservo | **481** | 500 |
| telefon, inter.,pošt.,ost.cest. | **6 298** | 10 000 |
| náklady UEA kolekt. čl.+EEU | **774** | 2 000 |
| poplatky bance | **2 065** | 2 100 |
| jízdné a stravné výkon funkce | **5 990** | 6 000 |
| příspěvky UEA | **31 565** | 20 000 |
| poplatek UK | **103 093** | 70 000 |
| kurzová ztráta | **0** | 2 000 |
| *příspěvky IFEF* | **15 710** | 30 000 |
| akce klubů a kroužků | **55 932** | 60 000 |
| ostatní nedaňové výdaje | **9 086** | 0 |
| příspěvky ILEI | **1 207** | 850 |
| **Výdaje celkem** | **376 231** | 365 450 |

## Esperanto en Ĉeĥa Televido

La 29-an de januaro 2010 Ĉeĥa Televido elsendis programon por emeritoj *Barvy života* (Koloroj de la vivo), konsistanta el pluraj dekminutaj raportaĵoj. La antaŭlasta estis filmita en la loĝejo de nia membrino inĝ. Margit Turková, kompreneble pri Esperanto.



Ŝi prezentis sian korespondadon kun eksterlandaj amikoj kaj preparadon de publikaĵoj, precipe de poeto Čestmír Vidman kaj tradukanto Jaroslav Krolupper. Omaĝe al la ĉi-jara datreveno de nia nacia poeto Karel Hynek Mácha (1810-1836) ili preparas novan poemaron de Č. Vidman kun motivoj pri Mácha.

*-mm-*

## Libroeldonado en 2009

Dum 2009 surmerkatiĝis 158 libroj en/pri Esperanto, kun entute 24 mil 272 paĝoj. En la supro de la listo de la plej aktivaj Esperanto-eldonejoj estas MAS (Monda Asembleo Socia), prizorgata de Vilhelmo Lutermano, kun 14 eldonitaj libr(et)oj politikaj kaj sociaj de maldekstraj aŭtoroj klasikaj (kelkaj de Markso) kaj modernaj, kiujn plejparte li mem tradukis. Tamen plej multajn paĝojn (2519) havis en 2009 ne MAS, sed la libroj de la Flandra Esperanto-Ligo.

Laŭ superrigardo de *La Ondo de Esperanto* (http://www.esperanto.org/Ondo/Novaj/Nov10-05.htm) en la dekado 1991-2000 aperis 2107 libroj (251.276 paĝoj), inter ili 258 beletraj originaloj, 458 tradukoj kaj 296 lerniloj. Ekde 2001 aperis libroj en jenaj kvantoj: 2001 – 222 libroj, 2002 – 174, 2003 – 224, 2004 – 183, 2005 – 159, 2006 – 204, 2007 – 184, 2008 – 201, 2009 – 158, inter ili sume 190 originaloj, 311 tradukoj, 275 lernolibroj kaj vortaroj. Ceteraj estas libroj fakaj, religiaj, politikaj, lingvistikaj k.s.

*laŭ OdE*

## 60 jaroj de Bona Volo

La Legio de Bona Volo (LBV), festanta ĉi-jare sian jubileon, estas brazila spiritualista, filantropa kaj eduka institucio. Ĝi praktikas karitaton ĉefe por infanoj kaj maljunuloj laŭ ekumenaj principoj. Ĝia esperantista departemento ofte eldonas bultenojn kaj librojn en Esperanto. Vidu www.bonavolo.com.

## Nova reta gazeto

Ĉe la adreso **http://barelo.blogspot.com** vi trovos blogon pri interesaj kaj aktualaj eventoj en Litovio, profesie faritan.

## Granda vortaro kroata-Esperanta

de Lucija Borčić enhavas 57 000 leksikajn unuojn (kapvortojn + derivaĵojn).

# KALENDARO

***2010-03-06*** *Esperanto-renkontiĝo en Svitavy, dvor.libuse@seznam.cz*
***2010-03-17*** *Jarkunveno de EK Přerov en restoracio Pegas (kontraŭ fervoja stacidomo) je la 17-a horo, m.svacek@seznam.cz*
***2010-03-29*** *Vespero de Věra Ludíková omaĝe al Božena Němcová en Náprstek-muzeo*
***2010-04-09/11*** *Sabla Printempo en Písek, seminario „Esperanto kaj Interreto", pisek@esperanto.cz*
***2010-04-12/18*** *Pensiono Espero en Skokovy, lingva seminario, nechvilep@seznam.cz*
***2010-04-16/18*** *Adonido (natur- / vin-amantoj), Ratíškovice melicharkova8@seznam.cz*
***2010-04-24*** *Esperanto-Renkontiĝo en Polička, dvor.libuse@seznam.cz*
***2010-05-7/8*** *Tradicia maja renkontiĝo de IKUE-sekcio, Spiritekzerca domo en Žirovnice, m.svacek@seznam.cz*
***2010-05-22*** *Tradicia renkontiĝo en Šumperk, LibuseHyblova@seznam.cz*
***2010-06-05*** *Infana Esperanto-tago en Svitavy*
***2010-06-12*** *Muzea nokto kun inaŭguro de 4-a ekspozicio „Pavel Rak" en E-muzeo Svitavy*
***2010-06-17/20*** *La 9-a TREP en Plasy, S. Pech, esperantoplzen@centrum.cz*
***2010-06-20*** *Ĉantorio, suchanekj@seznam.cz*
***2010-06-24/27*** *Internaciaj lingvaj kaj turismaj tagoj en Studený, nokosaksio@googlemail.com*
***2010-07-11/25*** *Flugkaravano al UK Kubo, chrdle@kava-pech.cz*
***2010-07-04/17*** *Unua etapo SET Lančov*
***2010-07-18/31*** *Dua etapo SET Lančov*
***2010-08-01/13*** *Tria etapo SET Lančov*
***2010-08-13/15*** *Renkonto de ekstendaranoj en Lančov, info@set-lancov.cz*
***2010-08-14/21*** *Ekotur en České Budějovice, chrdle@kava-pech.cz*
***2010-08-20/21*** *La 4-a Postferia (ĉi-jare Finferia) renkontiĝo en České Budějovice*
***2010-09-17/19*** *Simpozio okaze de 50-jariĝo de Esperanto-Klubo en Česká Třebová*
***2010-09-24/26 Konferenco de ĈEA, Poděbrady, cea.polnicky@quick.cz***
***2010-09-26/28*** *Seminario en Poděbrady*
***2010-10-11/17*** *InPaSem en Dobřichovice (S. Marček, M. Blahuš), chrdle@kava-pech.cz*
***2010-11-18/21*** *KAEST, Modra-Harmónia, Slovakio, P. Baláž, petro@ikso.net*
***2010-12-04*** *Marcipana Kristnasko en E-muzeo Svitavy, dvor.libuse@seznam.cz*
***2010-12-11*** *Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek*
***2010-12-29*** *E-Silvestro en Česká Třebová, jk.esperanto@seznam.cz*

***Kalendaro 2011***
***2011-03*** *Centjariĝo de EK Olomouc, dudajanol@centrum.cz*
***2011-05-07/14*** *La 63-a IFEF-kongreso, Liberec, ladislav.kovar@tiscali.cz*

## UMBERTO BROCCATELLI

La 11-an de februaro forpasis en Romo Umberto Broccatelli, Honora Membro de UEA ekde 2006. Li naskiĝis la 5-an de marto 1931. Eklerninte la lingvon en 1947 li tuj ekaktivis movade kiel unu el la refondintoj de Bolonja Esperanto-Grupo. Li kunorganizis nacian kongreson en Bolonjo en 1952 kaj la 40-an UK-on samurbe en 1955. De 1980 ĝis 2005 li membris en la Nacia Konsilio de Itala Esperanto-Federacio kaj estis plurfoje elektita al ĝia estraro. De 1989 ĝis 2002 li redaktis la organon de IEF, *l'esperanto*. Kiel fervora pledanto por la eŭropa unuiĝo li iniciatis la aliĝon de IEF al la Itala Konsilio de la Eŭropa Movado, en kies komitato li poste reprezentis IEF. En 1999 li reaktivigis Eŭropan Esperanto-Union, kiun li prezidis, ankaŭ redaktante ĝian informilon *Eŭropa Bulteno*, de 1999 ĝis 2004, kiam li iĝis honora prezidanto de EEU.

*Broccatelli aŭtoris la vortarojn Vocabolario Esperanto-Italiano (1984) kaj Dizionario Italiano-Esperanto, Esperanto-Italiano (2004), kaj la lernolibron Nuovo Corso di Esperanto (1993). Pri lingvaj demandoj de Esperanto li verkis multajn artikolojn kaj la broŝuron Esperanto, lingvo planebla (1996). Li tradukis ankaŭ beletraĵojn, i.a. por Itala antologio (1987).*

*(Gazetara komuniko de UEA)*

# Jak platit svazu

V kterékoliv pobočce Poštovní spořitelny a ve většině poboček České pošty si vyžádáte **tiskopis VKLAD**, který vyplníte ve všech kolonkách: **částka Kč** - sumu, kterou platíte, **č. účtu:** 195 230 825/0300, **variabilní symbol**: má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete L. Hýblové seznam, za koho platíte. **Konstantní symbol** je 0379 a **název účtu** je: Český esperantský svaz. Stejná čísla uveďte na ústřižek, který slouží jako doklad o platbě. Platba je bez poplatku.

Seznam čísel (variabilní symboly):

**06940** členství ČES
**06941** členství UEA
**06942** předplatné Starta bez členství
**06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
**06944** poplatek UK
**06945** kongres EEU
**50200** sekce železničářů IFEF
**50400** komise pedagogická ILEI
**50401** písemný kurs začátečníci
**50402** písemný kurs pokročilí
**50404** Paroliga kurso
**50405** svazové zkoušky
**50800** sekce nevidomých LIBE
**50900** sekce zdravotníků UMEA
**51000** sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
**51100** sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 86-7290070227/0100
**51200** sekce informatiky
**70100** komise pro tisk a inf.
**80200** ediční fond
**80300** propagace v tisku
**80400** fond Tilio

### Upozornění pro sekce, kluby a kroužky ČES

Občanská sdružení jsou podle vyhl. 634/2004 Sb. osvobozena od placení poplatků za ověření listiny - t.j. položka 4 - a za ověření podpisu - t.j. položka 5.

# Zájemci o časopisy

**POZOR na změnu bankovního účtu!**

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz. Předplatné uhraďte na účet u Poštovní spořitelny v Poděbradech, č. ú. 231 798 902/ 0300, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

**Monato:** 990,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 590,-Kč
**La Gazeto:** 600,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5
**La Ondo de Esperanto:** 560,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4, reta versio 340,- Kč.
**Juna Amiko:** 260,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 32 stran formátu A5
**Literatura Foiro:** 1010,- Kč (*670,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5
**Heroldo de Esperanto:** 1090,- Kč (*730,- Kč), v.s. 07006, 17 čísel ročně, 4 strany formátu A 3
**Femina:** 670,- Kč (*450,- Kč), v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A4
**Litova Stelo: 29**0,- Kč, v.s. 07008, 6 čísel ročně, 36 stran formátu A5

*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".

**Periodikum Českého esperantského svazu - 41. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**malovec@volny.cz http://members.chello.cz/malovec/**

**Předplatné v Česku (bez členství ve svazu): 200 Kč**

**Členská evidence a změny adres:**

**p/a Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, libusehyblova@seznam.cz, tel. 774 928 974**

**Uzávěrka příštího čísla**: 7.5.2010

**-------------------------------------------**

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio - - 41-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 10 eŭroj**

**(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,**

**Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**Ĉeĥio, malovec@volny.cz**

**http://members.chello.cz/malovec/**

**Presis: DTP centrum, Svitavy**

**Redakto-fermo de la sekva numero**: 7.5.2010

**ISSN 1212-009X**